La Ondo de Esperanto

Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2026. №3



Internacia sendependa almanako en Esperanto. 2026. №3 (329)

***La Ondo de Esperanto* aperas kiel bitgazeto laŭ la normoj “pdf” kaj “ePub”.**
Aperas ĉiusezone. Senpaga literatura suplemento jarfine.
Fondita en 1909 de Aleksandr Saĥarov. Refondita en 1991.
Eldonas kaj administras: Halina Gorecka
Redakcio:

Aleksander Korĵenkov (redaktoro)
Paweł Fischer-Kotowski (vicredaktoro)
Peter Baláž
Stanislav Belov
István Ertl
Irina Gonĉarova
Povilas Jegorovas
Wolfgang Kirschstein
Paŭlo Moĵajevo

Poŝta adreso: RU-236039 Kaliningrad, Staropregolskaja nab., 10-13, Ruslando
Retpoŝta adreso: laondodeesperanto@gmail.com
Retejoj: https://esperanto-ondo.ru, https://sezonoj.ru
Abontarifo por 2026

Abonanto: 15 eŭroj, 17 usonaj dolaroj, 850 rubloj
Amiko: 30 eŭroj, 34 usonaj dolaroj, 1700 rubloj
Patrono: 100 eŭroj, 110 usonaj dolaroj, 5500 rubloj

Anonctarifo

Plena paĝo: 50 eŭroj (5000 ruslandaj rubloj)
Duona paĝo: 30 eŭroj (3000 rubloj)
Kvarona paĝo: 15 eŭroj (1500 rubloj)
Okona paĝo: 10 eŭroj (1000 rubloj)
Triona rabato pro ripeto.

Donacoj: La donacoj estas danke akceptataj ĉe la redakcia adreso (ruslandaj rubloj) aŭ ĉe nia UEA-konto “avko-u” ĉe UEA.

Recenzoj: Bonvolu sendi du ekzemplerojn de la recenzota libro, kasedo, disko k. a. al la redakcia adreso.

Represoj: Oni povas represi tekstojn kaj bildojn nur kun permeso de la redakcio aŭ de la aŭtoro kaj kun indiko de la fonto.

“La Ondo de Esperanto” (Волна эсперанто). 2026, №3 (329).
Ежеквартальный журнал на языке эсперанто.
Учредитель и издатель: Горецкая Г. Р. Редактор: Корженков А. В.
Подписано в печать: 4 октября 2026 г.

© La Ondo de Esperanto, 2026

En ĉi tiu numero

Bazaj informoj pri “La Ondo de Esperanto” 2
En ĉi tiu numero 3
Redakcie 5
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Donacoj en 2026 5
“La Ondo” daŭros kiel novaĵretejo. 5
Temo 6
Jukka Pietiläinen. Varmega kongreso en Graco 7
La kongresa rezolucio 10
Novaj honoraj membroj kaj honora prezidanto de UEA. 11
14 diplomoj pri Elstara kaj Elstara Arta Agadoj 11
Premio Deguĉi 2026 al Kuba Esperanto-Asocio. 12
La sciencaj premioj Pirlot kaj Power. 13
Aleksander Korĵenkov. Legu artikolojn pri ĉiuj UKoj okazintaj ekde la 1991a jaro. 14
Aleksander Korĵenkov. Graco iomete pli amasa ol Brno 15
Eventoj 16
Jordi Calafí. La 82a IJK: kulmino de jardeko da junulara renaskiĝo en Katalunio. 17
La Estraro de TEJO 2026-2027 19
Alessandra Madella. ILEI kongresis en ĉina universitato. 20
Marija Belošević. IKUE revenis al Graz post 105 jaroj 22
Miora Raveloharison. “Virinoj povoplenaj homoj”. 25
Ulrich Matthias. Elstara jubilea BET en la ĉefurbo de Latvio 30
Laura Brazzabeni. Italio: Pontoj inter lingvoj kaj komunumoj. 32
Robert Kamiński. Pollanda kongreso en la Malgranda Vieno 34
[La sola sviso]. La 15a Kultura Esperanto-Festivalo 36
Amanda Schmidt. Dek tagoj en usona Esperantujo. 37
Wu Guojiang. Verdstela flago flirtis en internacia ekspozicio 38
Julia Noe, Eddy van den Bosch. BEMI-semajno ĉe Erinaclago. 40
Julia Mul. La 20a datreveno de la Esperanto-urbo 42
Paul Quévy. Nova freŝa vento blovas super la Esperanto-kastelo 43
Noel Reysset. Somera renkontiĝo en Bretonia vilaĝo 44
Irina Gonĉarova. KLERo-3 kiel Esperanto-klerigejo. 45
Irina Gonĉarova. La kvara Kalejdoskopo de lingvoj en Odincovo 46
Invitu la Universalan Kongreson en 2029 aŭ 2030 48
La 83a IJK okazos en 2027 en Petzow 48
Tri novjarfestaj renkontiĝoj atendas vin 49
La Eŭropa Kongreso okazos en Provenco. 50
Venu al KS en Hangzhou!. 50
Koncize (8 novaĵoj) 51
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. Ni funebras kaj kondolencas 52

Tribuno 53
Johannes Genberg. "Mia vivo" fermiĝos je la fino de la jaro 54
Novaĵoj pri Societo Zamenhof 55
Esperanto por Nepalo – Solidareco sen landlimoj 57
Proponu kandidatojn por la premio Maertens 59
Lars Sözüer. Bicikle al IJK 60
Arkivo 62
Aleksander Korĵenkov. Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2026 63
Nick Nicholas. Du nekonatoj sur la kembriĝa foto de la Lingva Komitato (1907) 66
Lingvo 70
Federico Gobbo. Interlingvistiko kaj esperantologio: kelkaj spertoj el Nederlando 71
Bengt-Arne Wickström, Klaus Schubert. La 48a Esperantologia Konferenco: Konservi kaj progresi 78
Kirilo Brosch – Cyril Robert Brosch. Lingva Konsultejo: Pasive agres(em)a 79
Kulturo 80
Ivan Bunin. La sinjoro el San-Francisco (Trad. el la rusa Aleksander Korĵenkov) 81
Miguel Fernández. Kelkaj kortuŝaj momentoj en mia esperantista vivo 98
Virina Aŭtoro de la Jaro 107
Nikolao Gudskov. Julio Baghy en 33 lingvoj (Recenzo: Baghy J. Aŭtuna foliaro tra la lingvoj de la mondo: Internacia kolekto de tradukoj el Esperanto) 108
Paŭlo Moĵajevo. Nova tipe afrika muzika albumeto en Esperanto (Recenzo: Kris Fredi. La amo protektas nin) 109
Floréal Martorell. Revivi: La tria albumeto de Armel Amiot en Esperanto 111
Floréal Martorell. La unua bita unuopaĵo de IVIDOB' en Esperanto 112
Miguel Gutiérrez Adúriz. Rezultoj de la Belartaj Konkursoj de UEA en 2026 113
Literatura Konkurso Kálmán Kalocsay 2026 115
La rezulto de la 5a Interkultura Novelo-Konkurso 116
Dimitrinka Kateva. Rezulto de la 37a Internacia Literatura Konkurso EKRA 117
La Internacia Traduk-Konkurso Vejdo 2026 117
Aleksander Korĵenkov. Unesko-Kuriero pri rekonstruado 118
Literatura Foiro, 2026, №342 119
Literatura Foiro, 2026, №343 120
Halina Gorecka, Aleksander Korĵenkov. 4500 tekstoj en la novaĵretejo "La Ondo de Esperanto" 122
Mozaiko 123
La plej fruaj Esperantaj ŝercoj 124
István Ertl. Spritaj splitoj kaj preskeraroj 125

Kovropaĝe: Kvankam la plej grava ĉi-jara evento en Esperantujo estis la Universala Kongreso en Graco, la plej memorinda momento de la jaro estis la plena suneklipso, okazinta en la Internacia Junulara Kongreso en Katalunio, kiam tri centoj da esperantistoj observis la malaperon kaj la reaperon de l' suno, uzante specialajn okulvitrojn. (Foto: Hayden Hendricks)

Donacoj en 2026

Laŭ la stato je la 28a de septembro 2026 por la nuna abonjaro estas ricevitaj donacoj de ses patronoj kaj 27 amikoj, danke al kiuj 27 personoj dum la nuna jaro povas senpage ĝui la legadon de “La Ondo de Esperanto”. (En 2020 estis kvar patronoj kaj 18 amikoj, en 2021 – tri patronoj kaj 27 amikoj, en 2022 – kvar patronoj kaj 25 amikoj, en 2023 – kvar patronoj kaj 32 amikoj, en 2024 – ses patronoj kaj 29 amikoj, en 2025 – ok patronoj kaj 23 amikoj).

Patronoj (100 eŭroj): Werner Pfennig (Germanio), Etsuo Miyoshi (Japanio), Geoffrey Greatrex (Kanado), István Ertl (Luksemburgio), Artjom Barysev Ruslando), Venceslao Stepanov (Ruslando).

Amikoj (30 eŭroj): Leopold Patek (Aŭstrio), Malcolm Jones (Britio), Tim Owen (Britio), Petr Chrdle (Ĉeĥio), Jiří Machačík (Ĉeĥio), Lydia Lindla (Estonio), Tuomo Grundström (Finnlando), François Lo Jacomo (Francio), Marc Bavant (Francio), Benoît Philippe (Germanio), Julia Mull (Germanio), Margarete Bastian (Germanio), Sophia Brandt (Germanio), Ulrich Brandenburg (Germanio), Antonio del Barrio (Hispanio), Miguel Angel Bueno Avila (Hispanio), István Szabolcs (Hungario), Massimo Nannotti (Italio), Cho Sung Ho (Koreio), María Mesías (Luksemburgio), Bård Hekland (Norvegio), Ilona Koutny (Pollando), Aleksandr Ĉernyĥ (Ruslando), Bo Sandelin (Svedio), Bill Maxey (USA), Humphrey Tonkin (USA), Orlando E Raola (USA).

Koran dankon al ĉiuj subtenantoj!

Halina Gorecka
Aleksander Korĵenkov

“La Ondo” daŭros kiel novaĵretejo

En majo 1991 aperis la unua eldono de “La Ondo de Esperanto”, kaj ĝis aŭtuno 1997 ĝi aperis kiel dumonata revueto. En aŭtuno 1997 “La Ondo” iĝis ĉiumonata. En 2007 estis lanĉita bitversio de “La Ondo” laŭ la pdf-normo, kaj dum dek jaroj kunekzistis la papera kaj reta formoj.

En decembro 2016 aperis la lasta papera “Ondo”, kaj dum 2017-19 nia bitgazeto aperis ĉiumonate. En 2020 ĝi por sep jaroj iĝis trimonata, ampleksa bitgazeto.

La sekva, decembra eldono de nia gazeto por 2026 estos la lasta, kaj nia informado daŭros en nia novaĵretejo, en kiu dum pli ol 2400 tagoj ĉiutage aperas almenaŭ unu nova teksto (vd. p. 122).

Ĝis nun la retejo estis pagata el la kotizoj kaj donacoj, kiujn ricevis la gazeto. La financado de la retejo nun estas traktata kun eventuala sponsoro. Atendu informojn en la decembra “Ondo”.

La red.

Temo



La 111a Universala Kongreso de Esperanto okazis de la 1a ĝis la 8a de aŭgusto en bela kaj taŭga kongresejo en Graco – “Congress Graz”, konstruaĵo kun elegantaj salonoj kaj modernaj teknikaj ekipaĵoj. La sekvaj paĝoj estas dediĉitaj al la kongreso kaj ties rezultoj. (Foto: John Huang)

Varmega kongreso en Graco

111a Universala Kongreso de Esperanto

Graco, la 1-8an de aŭgusto 2026

La 111a Universala Kongreso de Esperanto en Graco (Graz, Aŭstrio) kolektis 1138 kongresanojn en ĉi tiu varmega mezepoka urbo komence de aŭgusto. Se la pasintjara, preskaŭ samregiona kongreso en Brno estis nur agrable varmeta, nun la temperaturo atingis 30 gradojn aŭ pli preskaŭ ĉiutage. Tamen la kongresejo estis klimatizita, sed ne tro malvarma. La vetero tamen kaŭzis interalie tion, ke la kutima futbala matĉo inter la Esperanta teamo kaj iu loka teamo ne povis okazi pro la varmego.

La kongresejo troviĝis en historia konstruaĵo, kie iam funkciis loka banko, kaj ĝi estis unu el la plej imponaj lastatempaj kongresejoj. La granda salono estis pompa sed funkcianta, la aliaj salonoj estis en proksimeco kaj facile troveblaj. Tamen la organizantoj eble miskalkulis la alvenon de granda parto de kongresanoj, kaj necesis vicatendi ekster la konstruaĵo pli ol unu horon. Eventuale multaj esperantistoj volis alveni iom frue por eviti amasojn, sed ĝuste tiel formiĝis la longaj vicoj. Krome la akceptejo estis, eble pro sekurecaj kialoj, tuj apud la ekstera pordo, do la vico devis esti ekstere.

Graco havas unu el la plej belaj Esperanto-monumentoj, kiu estis starigita en 1987. Ne temas pri busto de Zamenhof aŭ pri stelo, sed pri simbolo, eventuale temas pri kreskantaj folioj aŭ interplektitaj fingroj. Krome la monumento troviĝas en Esperanto-placo, kaj same nomiĝas ankaŭ la apuda tramhaltejo. En la placo troviĝas ankaŭ kafejo Esperanto, sed ĝin mi ne sukcesis viziti. La ĉi-jara kongreso portis al Graco novan Esperanto-objekton, nome Esperanto-arbon plantitan en loka parko.

La temo de la kongreso estis volontulado. Eble iom netradicia, pensante pri pompaj UNecaj kaj Uneskecaj temoj de pluraj antaŭaj UKoj, sed ĝi estis tute taŭga por esperantistoj, kiuj ja volontulas eble pli ol la homaro kutime. Laborantoj por UEA, kiel la prezidanto kaj estraranoj, ne nur laboras senpage, sed ili ankaŭ grandparte kontribuas pagante, el kio la prezidanto Fernando Maya estas bona ekzemplo, ĉar li pagis inter la unuaj la kotizon de dumviva membro de Societo Zamenhof.

Iom neatendite sed por meza Eŭropo relative normale, ne eblis pagi per kreditkarto en la kongreseja kafejo, kie eblis aĉeti malgrandajn manĝaĵojn kaj trinkaĵojn. La elekto ne estis aparte ampleksa, sed proksime troviĝis restoracioj por diversaj gustoj. Krome la urbocentro estis tuj apude, kio ne estas aparte ofta por UKoj.

En la inaŭguro partoprenis iom nekutime multaj gravuloj, ekzemple, la prezidanto de la Aŭstria Unesko-komisiono venis por informi, ke la komisiono formale agnoskis la Esperantan kulturon en Aŭstrio kiel parton de nemateria kultura heredaĵo. La kongresanoj krome montris sian solidarecon dum la “landaj salutoj”, kiuj jam iom tradicie okazis en formo de laŭtlegado de landonomoj kaj stariĝo de kongresanoj el tiuj landoj: ĉiu lando kaj ties landanoj ricevis grandajn aplaŭdojn, tamen la plej enorma estis la aplaŭdo por Ukrainio. Krome Kuba Esperanto-Asocio ricevis premion Deguĉi pro sia multjara agado en malfacilaj cirkonstancoj.

La nacia vespero prezentis aŭstran muzikon kaj stiriajn popoldancojn.Tute taŭga kaj atendebla programo, sed ĉu ne estis iom tro da dancoj? Loka specialaĵo estis kukurba oleo, kiun oni vendis en la kongresejo per kongresa varmarko. Tamen restis multaj boteletoj ankaŭ en la lasta tago. Mi partoprenis ankaŭ kelkajn ekskursojn, kion mi kutime ne faris: ankaŭ ili bone sukcesis kvankam en unu el ili kaj la ĉiĉerono kaj la busŝoforo unue portis la kongresanojn al loko, kiu estis planata nur kiel dua celo de ĉi tiu ekskurso. Tamen ĉio iris bone kaj senprobleme, eĉ sen malfruo.

Nova afero estis, ke la kongresa kuriero “Grazeto” aperis ne papere sed nur en la reto. Laŭ la organizantoj temis pri la paneo de la printilo, kiu devus produkti la paperan kurieron, sed ŝajnas, ke granda plimulto el kongresanoj kontentis pri la reta versio. Ĉu venontjare tute ne necesas eĉ plani paperan kurieron?

La libroservo funkciis nun sen la kutima libroservisto Ionel Oneţ, sed malgraŭ tio ĝi bone funkciis. La kvanto da ofertataj libroj estis iom pli granda ol kutime, eble pro la nesperteco de la elektanto de libroj. Tamen la kvanto da aĉetantoj ŝajnis esti



La kongresa libroservo (Foto: John Huang)

kontentiga. Nur iom ĝenis, ke la libroserva salono portis nomon de Lapenna, kiu ja verkis, sed ne unuavice memorindas kiel granda verkisto. Eĉ Moerbeek, kiu ja pakis kaj ekspedis la librojn estus pli taŭga nomo por tiu salono.

La komunista urbestrino Elke Kahr ne povis mem ĉeesti, sed alia sampartiano Elke Heinrichs akceptis kongresanojn en la urbodomo tuj apud la kongresejo kaj krome partoprenis en la inaŭguro kaj fermo. En la fermo ŝi eĉ jodlis. En la urbodomo ŝian paroladon tradukis la prezidanto de la LKK de la sekva Universala Kongreso Sandor Horvath. Horvath kaj Heinrichs studis kune en sia junaĝo en Graco, do la mondo malgrandas.

La komitato de UEA ŝajnis pli aktiva ol kutime, tamen la longe planata statuta reformo ankoraŭ ne pretis por akcepto, kaj la komitatanoj nur ricevis informojn pri la proceso. Krome la komitato kunsidis jam antaŭ la kongreso distance kaj tiel restis malpli da komitataj devoj por la kongresa semajno.

Laŭdire la scienca programo estis nekutime ampleksa, sed ŝajnas al mi, ke mi aŭdis tiun frazon jam pli frue, sed eble ĉi-foje ĝi ja pravis. Nu, certe eblas, ke la scienca programo daŭre kreskas kaj evoluas, kaj ĉi-foje eblis konatiĝi kun i.a. sun-eklipsoj, slavaj popoloj en Habsburga imperio kaj artefarita intelekto.

Unu el la diferencoj de multaj lastatempaj kongresoj estis ankaŭ, ke ne okazis infana kongreseto. Malfacilas diri, ĉu pli mankas Esperantaj infanoj aŭ la organizantoj. Tamen estis planita infana programo en la kongresejo mem. Aliflanke, la kongreson partoprenis unu finnlanda kongresano, kiu semajnon post la kongreso fariĝis centjara, kaj unu aŭstria kongresano estis jam centjara, sed ne povis fizike partopreni.



La komitato de UEA (Foto: John Huang)

Ankaŭ la kultura programo estis impona: la tradiciaj “Kajto” kaj Ĵomart kaj Nataŝa plu muzikis. Ho, ve kiel la homoj maljuniĝas. Sed aperis ankaŭ pli novaj kaj pli junaj muzikistoj, do la Esperanta muzika kulturo plu evoluas.

Jukka Pietiläinen

La kongresa rezolucio

La 111-a Universala Kongreso de Esperanto okazis en Graco en 2026 sub la temo “Volontulado en la servo al daŭripova evoluigo”, dum la Internacia Jaro de Volontuloj por Daŭripova Evoluigo, proklamita de Unuiĝintaj Nacioj. La Universala Kongreso mem, kiu okazas ĉiujare, estas konkreta ekzemplo de internacia volontula kunlaboro: ĝi ebliĝas danke al la sindona laboro de multaj volontuloj el diversaj landoj.

La Esperanto-movado ekde sia komenco vivas per diversfona volontula engaĝiĝo kaj havas fierindan kaj daŭran historion da mondplibonigaj agadoj. Ĝiaj valoroj – interalie respekto de homaj rajtoj, internacia solidareco, homa emancipiĝo kaj transnacia edukado – profunde kongruas kun la Celoj por Daŭripova Evoluigo (CDE) difinitaj de Unuiĝintaj Nacioj, nomataj ankaŭ Agendo 2030.

Tra la mondo esperantistoj kaj esperantistaj organizaĵoj jam kontribuas al tiuj celoj per agadoj pri edukado, kulturo, socia inkluziveco, genra egaleco, respekto de la naturo, mediprotektado, internacia solidareco, packonstruado kaj aliaj kampoj, ofte kunligante lokan agadon tutmonden. La kongreso konstatas, ke la vojoj por atingi la Celojn por Daŭripova Evoluigo estas ankoraŭ tre longaj kaj ke ofte la decidantoj ignoras ilin.

La Kongreso bedaŭras la nunan tendencon al repolusigo de la mondo en influzonojn, kiuj favoras mensogojn, timigadon kaj solvon de malekvilibroj per forto kaj milito, anstataŭ per dialogo kaj respekto al internacia juro.

La kongreso esprimas sian subtenon al la centra rolo de Unuiĝintaj Nacioj en la kunordigado de internacia kunlaboro por daŭripova evoluigo kaj instigas la membroŝtatojn provizi al ĝi la necesajn rimedojn, kompetentojn kaj politikan subtenon por efike plenumi tiun rolon.

Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Eventoj



“La IJK estis aparte memorinda pro la plena suna eklipso de la 12a de aŭgusto. La natura fenomeno estis unu el la ĉefaj allogaĵoj de la kongreso kaj donis al ĝi scenon, kiun malfacilas ripeti”, – skribis en sia artikolo Jordi Calafí, unu el la ĉefaj aktivuloj de la nova generacio de la junulara movado en Katalunio. (Foto: Irene Albert)

La 82a IJK: kulmino de jardeko da junulara renaskiĝo en Katalunio



De la 9a ĝis la 16a de aŭgusto 2026 Tiana, apud Barcelono, fariĝis la centro de la Esperanta junulara vivo. En la junulargastejo “La Conreria” okazis la 82a Internacia Junulara Kongreso (IJK), organizita de TEJO kun la loka kunlaboro de la Kataluna Esperanto-Junularo (KEJ).

Por la kataluna Esperanto-movado ĝi estis multe pli ol internacia kongreso. Ĝi estis la kulmino de procezo, kiu dum ĉirkaŭ dek jaroj iom post iom revigligis la junularan agadon en Katalunio.

De RenKEJtiĝo ĝis IJK

La nuna forto de la kataluna junulara movado ne aperis subite. Post periodo de malaktiveco, nova generacio de junaj esperantistoj komencis rekonstrui la agadon kaj doni al ĝi novan impulson. Sed en 2023 RenKEJtiĝo okazis en Manresa, kunveno kiu montris, ke en Katalunio denove ekzistas junulara komunumo kapabla kunveni, organizi kaj krei. La evento estis ankaŭ raportita en “La Ondo de Esperanto”, same kiel poste multaj aliaj katalunaj aranĝoj.

Tio estas grava parto de la historio de la nuna IJK. Dum la lastaj jaroj la kataluna junularo ne nur partoprenis internaciajn eventojn, sed iom post iom akiris sperton en ilia organizado: RenKEJtiĝoj, kursoj, bierumadoj kaj aliaj agadoj kreis komunumon, kiu povis transiri de la organizado de malgrandaj lokaj aranĝoj al multe pli ambicia projekto: gastigi IJK-n. Jam antaŭ la IJK, la kataluna movado estis konata pro siaj regulaj agadoj kaj kreskanta vigleco. La decido gastigi IJK-n en Katalunio do estis samtempe la pinto kaj nova paŝo de tiu evoluo.

La suneklipsa IJK

La IJK estis aparte memorinda pro la plena suna eklipso de la 12a de aŭgusto. La natura fenomeno estis unu el la ĉefaj allogaĵoj de la kongreso kaj donis al ĝi scenon, kiun malfacilas ripeti. La kongresanoj povis kune travivi tiun maloftan momenton, inter la internacia etoso de la IJK kaj la mediteranea pejzaĝo de la regioneto “Maresme” kaj de urbeto Comarruga, kie la ekskursantoj spertis 100% da mallumeco.

La programo estis konstruita ĉirkaŭ la kongresa temo “Naturo el la homaj okuloj”, kiu permesis esplori la rilaton inter homoj kaj naturo el multaj malsamaj perspektivoj. La kongresejo mem, La Conreria en Tiana, troviĝis meze de arbaro, de kie oni povis vidi la Mediteranean Maron. La programo estis tre varia: okazis programeroj



La eklipso jam komenciĝis. Baldaŭ la suno nigriĝos (Foto: Suna P)

en la naĝejo, pri jogo, tradiciaj dancoj (Sardana, bastondanco…), enkonduko al Toki Pona, kursoj de Esperanto kaj multaj kursoj kaj aktivecoj pri la kataluna lingvo, kulturo kaj historio. Estis ankaŭ multaj prelegoj kaj debatoj pri diversaj temoj, krom la plurhora kunsido de la Komitato de TEJO.

La rilato kun la naturo aperis ne nur en la diskutoj: unu ekskurso kondukis la partoprenantojn al bruligita arbaro, kie oni parolis pri arbaraj fajregoj kaj ties sekvoj. Samtempe, la kongreso estis ankaŭ granda kultura festo. Inter la koncertoj elstaris tiu de Indubio, kiu estis tre sukcesa, same kiel koncertoj de Kimo, “La Perdita Generacio”, Johano en la gufujo kaj aliaj muzikistoj.

La temo ligiĝis ankaŭ al la kataluna kunteksto de 2026, la Jaro Gaudí, kaj al la natura evento, kiu markis la kongresan semajnon: la plena suneklipso. Krom la programo en Tiana, okazis ekskursoj al Barcelono kaj al Subirats, la Esperanta Urbeto en la regiono Penedès, kie la urbodomo akceptis la kongresanojn; poste la grupo iris al la strando de Sitges. Post la oficiala fino de la kongreso, parto de la partoprenantoj daŭrigis la kunvivadon per improvizita postkongresumado.

Entute aliĝis ĉirkaŭ 300 homoj el pli ol kvardeko da landoj. Tiel la IJK fariĝis samtempe internacia junulara renkontiĝo, kultura festivalo kaj okazo por konatiĝi kun Katalunio: de ĝiaj arbaroj kaj Mediteranea Maro ĝis ĝia lingvo, muziko, arkitekturo kaj urboj.

La plej bona evento laŭ la rangigo “Laŭsperte”

Malantaŭ tiu semajno de festo troviĝas jaroj da laboro kaj multaj horoj da volontula laboro. Organizi internacian kongreson de tiu grandeco estis grandega defio por la kataluna teamo. Estis defioj pri loĝado, transporto, manĝado, teknika preparado, homfortoj kaj dekoj da aliaj detaloj. Inter la plej malfacilaj temoj estis ankaŭ la financoj. La oficiala IJK-retejo mem substrekis la gravecon de donacoj por povi kovri la kostojn de profesia kaj riĉa kongresa programo.

Ankaŭ indas diri ke la kongreso estis voĉdonita kiel la plej bona Esperanto-evento en la rangigo “Laŭsperte” de TEJO. Tiu rekono estas aparte ĝojiga por ĉiuj organizantoj, kiuj dum monatoj fortege laboris.

Alia pozitiva rezulto estas, ke la IJK donis al tuta generacio sperton, kontaktojn kaj konfidon por pli organizi viglajn movadojn en la hejmaj landoj de partoprenantoj: Francio, Brazilo, Usono…

Do nun, rigardante malantaŭen, unu afero estas klara: la jaroj da laboro estis vere fruktodonaj. La nigra suno pasis, sed la kataluna junulara movado denove brilas.

Jordi Calafí



Foto: Lucía Montserrat Fernández Barrera

La Estraro de TEJO 2026-2027

La Komitato de TEJO elektis la Estraron de TEJO por la mandato 2026-2027. La nova Estraro ekoficis la 1an de septembro 2026.

Prezidantino: Ana Ribeiro, Vicprezidanto: Espoir Ngoma Kasati, Ĝenerala Sekretario: Jean de Dieu Kikako, Kasisto: Emerson dos Santos, Estrarano: Francesco Giuliano, Estrarano: Severija Marija Banaitytė, Estrarano: Jonathan Schneider.

ILEI kongresis en ĉina universitato



La 59a Kongreso de Internacia Ligo de Esperantistaj Instruistoj (ILEI) sukcese okazis ĉe Zaozhuang-a Universitato de la 11a ĝis la 16a de julio 2026. La Kongresa Libro, senpage elŝutebla el la retejo https://www.ilei.info listigas la 192 partoprenantojn el kvar kontinentoj. La matenon de la 10a de julio Sun Mingxiao (Semio) prezentis Esperanton en urba muzeo, dum Lee Jungkee, honora prezidanto de la Korea Esperanto-Asocio, instruis Esperanton al civitanoj en alia parto de la urbo. La estroj de la Universitato organizis kunvenon en la nova kampuso por bonvenigi la gastojn, kun komuna plantado de arbo kun memora ŝtono, sekvita de riĉa bankedo kun lokaj bongustaĵoj.

La 11an okazis la malferma ceremonio, kun salutoj de la rektoro Cong Hailin, de la prezidanto de Ĉina Esperanto-Ligo Liu Dawei kaj de la nova estro de la Ĉina Sekcio de ILEI, Yan Ming, iama rektoro de Hejlongjiang-a Universitato en Harbino. La prezidanto de ILEI Ahmad Reza Mamdhui ne povis ĉeeste partopreni pro la geopolitika situacio kaj tial sendis gratulan videon. Tamen danke al la hibrida formato de la evento li povis aktive ĉeesti preskaŭ ĉiujn partojn de la Kongreso kaj la tutan Simpozion. Dum la evento mi prezentis la Simpozion de ILEI 2026, kiun mi organizis en mia duobla rolo kiel vicprezidanto de ILEI kaj profesoro de la Esperanta fako de Zaozhuang-a Universitato. Sekvis gratulaj leteroj kaj videoj, kiel tiuj de profesorino Ilona Koutny kaj de Aziz M. Muzafarov, akademiano de la Rusia Akademio de Sciencoj, kiu vidas Esperanton kiel futuran lingvon de BRIKS.

La inaŭguraj prelegoj de Arko (Gong Xiaofeng) kaj Semio enkondukis la Kongresan temon, “Eduki profesiajn esperantistojn kaj protekti Esperanto-kulturon”, en kiuj ili detale prezentis la kontribuojn de Zaozhuang-a Universitato kaj de aliaj ĉinaj instancoj al tiu kampo. Konkludis la matenon la tri prelegoj de ISOA (ILEI-Seminario en Orienta Azio): Yu Jianchao pri sia instruisto Laŭlum, Kitagawa Ikuko pri instruaj agadoj en Japanio kaj Lee Jungkee pri Seula Esperanto-Centro.

Posttagmeze ekis la Simpozio de ILEI, kiu daŭris unu tagon kaj duonon kaj vidis la kontribuon de 26 profesoroj kaj fakuloj el 17 landoj, reprezentantaj universitatojn de kvar kontinentoj. La temon “Plialtigi lingvan konscion” inspiris serio de artikoloj pri metalingvistika kompetento publikigita en “Internacia Pedagogia Revuo”, la organo de ILEI, fare de Ekaterina Bebenina. Kompare kun aliaj universitat-nivelaj Esperantaj konferencoj, la Simpozio de ILEI estas tipe organizata kiel diskutado inter esperantistaj kaj neesperantistaj universitatanoj, por montri la utilecon de Esperanto en sciencaj interparoloj kaj samtempe malfermi Esperantujon al novaj tendencoj kaj argumentoj en la akademia mondo. Sesioj esploris diversajn aspektojn de la temo, kiel kreskigi konscion pri kio estas lingvo en lernejoj, esplori ties rolon en

literaturo kaj teatro, kritiki hegemonion kaj subteni malplimultajn lingvojn kaj precipe reliefigi la gravan rolon, kiun Esperanto povas ludi en tiuj kampoj, danke al siaj lingvistikaj kaj peradaj aspektoj.

Malfermis la laborojn la fama barata profesorino Rama Mathew, kiu esploris kiel la eblo respondi al malfermaj demandoj per sia(j) gepatra(j) lingvo(j) helpas testi kiel barataj lernantoj komprenas anglajn tekstojn, en plurlingva medio, kies riĉecon substrekis ankaŭ A. Giridhar Rao. De la Esperanta flanko, Bengt-Arne Wickström prelegis pri lingva konscio kiel strategio por la pluvivo de malplimultaj lingvoj, dum François Lo Jacomo kaj mi parolis pri la historio de eksperimentoj pri la instruado de Esperanto, kaj konkludajn rimarkojn donis Vicente Manzano-Arrondo.

Bedaŭrinde ne estas ĉi tie spaco por listigi ĉiujn simpoziajn prelegojn, kiuj tamen spekteblas en ludlisto de la jutuba kanalo “Esperanto + Edukado ILEI”. Ni povas tamen memori Sara Spanò pri itala magia realismo, Aikawa Takuya pri la hangula literatura stilo, Kimura Goro pri interlingvoj kiel periloj, Katalin Kováts pri la memtaksiloj de la ekzameno KER-UEA kaj Ekaterina Bebenina pri Esperanto kaj metafaka edukado. Pan Zhongwu, Tan Zhongqi, Yu Mei kaj Wei Yongquan parolis pri etnaj lingvoj de Ĉinio, dum Nina Danylyuk prezentis interkulturajn konsiderojn pri la instruado al ĉinaj lernantoj.

La programo de la 13a de julio vidis Internacian Seminarion pri Esperanto-instruado, kun kontribuoj el Burundo, Ĉinio, Italio, Japanio, Koreio kaj Ruslando. Dima Ŝevĉenko kaj Anna Striganova prezentis sian instruadon de Esperanto ĉe la Universitato de Amikeco inter Popoloj kaj la proponojn de al eldonejo “Impeto”, dum



Tatjana Loskutova, kiu instruis la progresintan kurson dum la kongreso, prezentis sian eseon pri reta Esperanto-instruado, kiu gajnis honoran mencion en la Premio La Torre de ILEI.

Post la oficiala fermo, dum kiu la rektoro de Zaozhuang-a Universitato transdonis la Kongresan flagon al ILEI-estrarano pri kongresoj Laura Brazzabeni, ekis seminario pri la konservado de la Esperanto-kulturo, kun prelegoj de Semio kaj Li Bochuan (Briko) pri la Esperanto-muzeo de Zaozhuang-a Universitato. Gvidita vizito al la muzeo mem montris la gravan kontribuon de Esperanto al ĉina historio, de la unuaj esperantistoj en Harbino ĝis la amikeco inter Eroŝenko kaj Lu Xun (Lusin), de la subteno de Mao Zedong ĝis la Esperanto-sekcioj de ĉinaj komunikiloj.

Vesperaj spektakloj kaj filmoj prezentis interalie dokumentajn filmojn pri Yunnan-aj elefantoj kaj la produktado de teo, dum animacio de loka studio rakontis historion pri la pacema filozofo Mozi, kiu naskiĝis en Zaozhuang, kaj lia disĉiplo Lu Ban. La postkongreso portis nin al iliaj muzeoj kaj al la proksimaj lokoj de Konfuceo por pli profunde kompreni la ĉinan pensmanieron. La antikva urbo Taierzhuang prezentis la ĉinan reziston kontraŭ la japana agreso dum la Dua Mondmilito, dum ekskurso al la plej granda sensala lago de norda Ĉinio ebligis sperti la lokan naturon.

Jam ekis la preparoj por la 60a Kongreso de ILEI, kiu okazos en Jelenia Góra en Pollando en julio 2027, kune kun la 2a Virina Kongreso kaj la komuna temo “Instrui, inspiri, inkluzivi”. Espereble multaj samideanoj – kaj nesamideanoj se temas pri la Simpozio – povos partopreni.

Alessandra Madella

IKUE revenis al Graz post 105 jaroj

Post 105 jaroj IKUE denove kongresis en Graz. En tiu urbo okazis jam la 7a Kongreso de IKUE, dum la ĉi-jara 77a Kongreso estis la kvina organizita en Aŭstrio. La kongreso kies temo estis “Sinjoro, donu al mi veran kredon, firman esperon kaj senkondiĉan amon” (Sankta Francisko), okazis de la 25a de julio ĝis la 1a de aŭgusto en Kolpinghaus. La hibrida formo ebligis partoprenon ankaŭ al tiuj, kiuj ne povis veni al Graz. Ili sekvis prelegojn, preĝojn kaj mesojn kaj aktive partoprenis la programon.

Post la enkonduka prelego de pastro Serhij Prudko el Ukrainio, la programo disvolviĝis laŭ pluraj ĉefaj temoj.

Gravan lokon okupis la franciskana temo. Mirella De Martini el Italio prelegis pri paco kaj la mesaĝo de militmonumentoj, invitante sekvi la instruojn de Sankta Francisko. Krešimir kaj Marija Belošević el Kroatio prezentis franciskanojn, kiuj lasis gravajn spurojn en la katolika kaj en la ĝenerala Esperanto-movado. Oni ankaŭ pripensis la aktualecon de la spirito de Sankta Francisko 800 jarojn poste kaj ĝian signifon por la katolika Esperanto-movado hodiaŭ.

Alia grava temo estis martireco. Marija Belošević prezentis IKUE-anojn kiuj perdis la vivon dum la Hispana Enlanda Milito kaj dum aŭ post la Dua Mondmilito. Inter ili troviĝas tri personoj jam altigitaj al la honoro de la altaroj: sankta Titus Brandsma kaj la beatoj Dom Lazër Shantoja kaj Max Josef Metzger. Apartan lokon okupas ankaŭ sankta Maksimiliano Kolbe, la ĉiela patrono de IKUE. Karl Reinisch el Aŭstrio prezentis la vivon de Max Josef Metzger, kiu dum parto de sia vivo loĝis en Graz kaj tie ankaŭ grave aktivis por Esperanto. Pavol Petrik el Slovakio parolis pri la ankoraŭ ne tre konata Mikuláš Jozef Lexmann OP. La temo pri martiroj estis kompletigita per sankta meso en la preĝejo Maria la Helpantino, kie oni aparte memoras pri sankta Maksimiliano Kolbe.

La kongreso rigardis ankaŭ al nuntempaj defioj. Milton Paulo de Lacerda el Brazilo prelegis pri “Artefarita Inteligento antaŭ la Kredo”, kaj surbaze de “Magnifica humanitas” okazis diskuto kaj laborgrupo pri artefarita inteligento.

Pastro Gabriel Anda el Kamerunio prezentis la reeĥojn de la vizito de papo Leono la 14a en Afriko, aparte la ekzemplon de Kamerunio kaj la papan inviton al repaciĝo kaj paco. Li ankaŭ parolis pri la karitata agado de IKUE kaj ĝia subteno al la lernejo “Baba Simon”.

Grupeto da kongresanoj sur la Esperanto-placo en Graco ĉe la monumento “La Espero”, instalita en 1987 okaze de la centjara jubileo de Esperanto. (Foto: Marija Belošević)



Perlo Miela el Hungario dividis personajn spertojn pri la signifo de la kredo en la ĉiutaga vivo, dum Alberto García Fumero el Kubo invitis pripensi la evangeliajn vortojn “Venu al mi ĉiuj, kiuj estas laborantaj kaj ŝarĝitaj”. Karl Reinisch prezentis la sanktejon Schönstatt kaj ĝian komunumon en Aŭstrio kaj Elda Doefler el Italio parolis pri “Religio per Esperantaĵoj”.

Dum la kongreso estis prezentitaj tri novaj libroj “Dilexi te” kaj “La forto de la Evangelio” de papo Leono la 14a kaj “Chiara Lubich: La ĉielo kaj la homaro – Il cielo e l’umanità” kiun IKUE eldonis kune kun Vicenza Esperanto-Centro.

La pilgrimtago kondukis la kongresanojn al Mariazell, kie en la baziliko, antaŭ la altaro de la Dipatrino estis celebrita sankta meso en Esperanto.

La kongresanoj festis ankaŭ la Tagon de Esperanto, la 26an de julio, per vizito al la Esperanto-placo kaj la Esperanto-monumento en Graz. Inter ili estis Klaus Perko, unu el la iniciatintoj de la starigo de la monumento kiu prezentis ĝian historion.

Speciala vespero estis dediĉita al IKUE-jubileuloj: Norma Cescotti, kiu atingis 100 jarojn, Sergio Boschin (95), Klaus Perko kaj Miloslav Švaček (85), Tiziana Fossati, Jozef Reinvart kaj pastro Gustavo Zanoli (75). Pluraj jubileuloj partoprenis per Zoom, dum Perko persone ĉeestis la kongreson.

La lasta kongresa tago alportis pliajn memorprogramojn. Edvige Ackermann memorigis pri la kvina datreveno de la morto de Antonio De Salvo kaj lia granda kontribuo al la Esperanto-movado. Ŝi ankaŭ prezentis erojn el la riĉa originala kaj traduka verkaro de Lucija Borčić, okaze de la 105a datreveno de ŝia naskiĝo.

Aparte kortuŝa estis la memoro pri IKUE-anoj kaj simpatiantoj kiuj forpasis inter la du kongresoj: Simon Petrus Smits, Zora Heide (Vinceljak), frato Piero Spagnolini, Emile Malanga Nianga, Gerda Dercks, Jeremiasz Ratajczyk, pastro Stanisław Płatek, Ivo Osibov kaj Hans Michael Maitzen. La programeron ĉeestis ankaŭ la prezidanto de UEA Fernando Maia kaj la vicprezidanto Seán Ó Riain, kiuj alparolis la kongresanojn. Personaj atestoj pri jardekaj amikecoj kaj kunlaboroj, historiaj fotoj kaj kontribuoj de familianoj donis al la memoro aparte personan karakteron. Sekvis sankta meso por la forpasintaj membroj, subtenantoj kaj simpatiantoj de IKUE.

La kongreso kompreneble donis ankaŭ okazon por pridiskuti la agadon de IKUE kaj la defiojn, kiuj staras antaŭ la 116-jara asocio.

Por parto de la kongresanoj la restado en Graz ankoraŭ ne finiĝis. Ili restis por partopreni la 111an Universalan Kongreson de Esperanto.

Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Tribuno



Lars Sözüer rakontas pri la 1723-kilometra vojaĝo de sia hejmurbo Duisburg al Tiana, la loko de ĉi-jara Internacia Junulara Kongreso de TEJO, kiun li entreprenis kun sia edzino Christine Brücker, al kiuj poste aliĝis ilia filo Demlin. Legu prian raporton sur la paĝoj 60-61.



“Mia Vivo” fermiĝos je la fino de la jaro

En marto 2026 Mia Vivo estis haltigita de la servila servo pro la kiomo da uzo de la komputilaj rimedoj. Post 10 tagoj la problemo estis solvita, per forigo de pluraj ne tiel necesaj funkcioj. Tiel la retejo reiĝis al normala stato.

Mi ricevis novan averton pri la sama problemo: “Mia Vivo uzas tro da komputilaj rimedoj”. Ĉi-foje la servila servo ne haltigis la retejon, sed ĝi postulas ke mi malmultigu la uzadon. La problemo tamen estas, ke ĉio ĉi estas la rezulto de la grandiĝo de Mia Vivo. Kvankam MV ne plu estas tiel populara kiel je la komenco, ĝi bezonas pli kaj pli da rimedoj por zorgi la ĝisnunajn datumojn. Mi jam pagas por la plej bona servo ebla, sed tio baldaŭ ne plu sufiĉos. La servila servo estas relative malmultekosta, kaj tio ebligis min eĉ krei Mia Vivo per mia lima budĝeto. Sed ĉar la servila servo ne ofertas pli bonan servon eĉ kontraŭ pli da mono, mi havas nur tri alternativojn:

1. Serĉi alian servilan servon kaj transdoni ĉion tien. Kosto por transdono ne estas malmulta, sed pli grave, taŭga servilo por niaj nuntempaj kaj estontaj bezonoj kostas almenaŭ kvaroble ol la nuna. Mi ja ricevis mondonojn por la sekvaj du jaroj, sed tio ne sufiĉos eĉ por unu, eĉ se mi povus transdoni ĉion senkoste. Mi certe povas peti pli da mono de vi, la membroj, por daŭrigi la retejon, sed ĉar la mondonoj, kune kun la aktiveco, pli kaj pli malmultiĝas, mi devas esti preta pagi por ĉio mem. Mi simple ne havas tian monon kaj tio faras ĉi tiun alternativon nerealeca.
2. Transdoni Mia Vivo al esperanta asocio, kiu havas la necesajn lerton, monon kaj rimedojn. Tio estas mia prefera elekto, sed ne estas multaj organizoj kiuj plenumas la tri kondiĉojn. La plej grandaj neniam montris multe da intereso pri Mia Vivo. Ili ne eĉ respondis al miaj antaŭaj proponoj por kunlaboro. Mi tial dubas ke la E-movado havas la volon savi la retejon. Mi ĝojas se mi estas malĝusta pri ĉi tio, sed mi ne atendas miraklon.
3. Fermi la retejon. Dum 8 jaroj, realigi kaj prizorgi socian retejon por la esper-

antistaro estis mia revo kaj pasio (unue per Nubo, due per Mia Vivo), malgraŭ la granda kaj longtempa laboro kaj la multaj defioj kaj stultaj misoj. Mia Vivo neniam fariĝis “la interreta Esperantujo”, sed por multaj homoj, ĝi fariĝis loko por amikiĝi, diskuti kaj por montri siajn vivojn, malgraŭ la multaj aliaj alternativoj. Ĉiuj retejoj havas apartajn etosojn. Ankaŭ Mia Vivo, kaj tio evidente tiris certajn homojn al uzi MV kiel la ĉefan socian retejon. Tio ĝojigis min, kaj tio estas la plej granda fonto pri mia malĝojego pro la situacio. Mi plejkore dankas vin por via ĉeesto! Sen vi, Mia Vivo estus nenio!

La nuna plano estas fermi la retejon je la fino de la jaro, antaŭ ol mi devos pagi la sekvajaran koston por la plej multekosta servilo. Tio devas doni al vi sufiĉe da tempo ne nur por konservi ĉiujn konservindajn aferojn kiel bildojn kaj tekstojn, sed pli grave por doni al viaj amikoj la informojn por malperdi la kontakton.

Pri la donita mono: mi intencas redoni ĉiom, kiom ne estis jam uzata por la jaro 2026. Mi mesaĝos vin kiam mi finkalkulis la sumon.

Johannes Genberg

Fonto: https://www.miavivo.net/?status/1-1-1790244787/

Novaĵoj pri Societo Zamenhof

Societo Zamenhof, la rondo de donacantoj kaj mecenatoj de UEA, eniras sian duan duonjarcenton kun grava novaĵo: UEA oficialigis la Dumvivan Membrecon en Societo Zamenhof (DSZ) kaj starigis la Kapitalon Societo Zamenhof. La novaĵo estis oficiale anoncita dum la akcepto por membroj de Societo Zamenhof kadre de la 111a Universala Kongreso (UK) en Graz. La momento estas simbola: Societo Zamenhof estis konceptita en 1974 dum la 59a UK en Hamburgo, kiam donacantoj kaj patronoj de UEA kuniĝis por ĝin krei, kaj oficiale lanĉita en 1975 kadre de la 60a UK en Kopenhago; post sia 50-jariĝo en 2025, ĝi nun komencas sian duan duonjarcenton kun aldona formo de mecenateco kaj nova financa instrumento.

Dumviva membreco en Societo Zamenhof ne estas mem tutnova afero: antaŭ la oficialigo de DSZ kelkaj membroj jam proponis fari unufojan kontribuon por esti dumvive ligitaj al la Societo. Inter tiuj pioniroj estas E. Hjorth el Danio, C. Fettes el Irlando, C. Bracke el Belgio kaj K. P. Hoff el Norvegio. Ilia iniciatemo montris jam antaŭ jaroj, ke ekzistas intereso pri tia longdaŭra formo de subteno. Nun UEA formaligas kaj evoluigas ĝin per aparta strukturo kun klara regularo https://uea.org/teko/regularoj/regularo_kapitalo_societo_zamenhof.

Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Arkivo



Nick Nicholas per zorga esplorado trovis la nomojn de la du nenomitaj personoj sur la foto de la Lingva Komitato Esperantista, farita en Kembriĝo kadre de la tria Universala Kongreso de Esperanto. Je unu nesolvita enigmo malpli en la historio de Esperanto. Legu pli sur la paĝoj 66-69.

Jubileoj kaj memordatoj en oktobro 2026

2. Antaŭ 120 jaroj naskiĝis **Tomáš Pumpr** (1906-1926-1972), ĉeĥa juristo kaj esperantisto; tradukinto de "Bukedo el ĉeĥaj naciaj mitoj" de K. J. Erben (1938), "La bapto de caro Vladimir" de K. Havlíček Borovský (1952), "Invito" de Č. Knobloch (1968), "Sileziaj kantoj" de P. Bezruč (kun aliaj, 1970), "Majo" de K. H. Mácha (1997), "Poŝatlaso de la mondo" (kun aliaj, 1971), de pluraj tekstoj en "Ĉeĥoslovaka antologio" (1935) kaj de multaj aliaj verkoj inkluzive de tri operoj; aŭtoro de esperantologiaj studoj, redakciano de "La Nica Literatura Revuo", membro de la Akademio de Esperanto (AdE, 1962-72).

6. Antaŭ 135 jaroj naskiĝis **Kálmán Kalocsay** (Káloĉai, 1891-1911-1976), hungara kuracisto kaj elstara esperantisto, grave influinta la evoluon de la Esperantaj literaturo kaj lingvistiko, konsiderata kiel la plej grava Esperanta poeto ("Mondo kaj Koro", 1921; "Streĉita kordo", 1931; "Rimportretoj", 1931; "Sekretaj sonetoj", 1932; "Izolo", 1939, eldonita en 1977) kaj poezia tradukanto ("Infero" de Dante, tri verkoj de Ŝekspiro, poemoj de Baudelaire, Heine, Petőfi, Madách… kaj la antologio "Tutmonda sonoro" kun tradukoj el 30 lingvoj); kunaŭtoro (kun G. Waringhien) de "Plena gramatiko de Esperanto" (1935, poste: "Plena analiza gramatiko de Esperanto") kaj de "Parnasa gvidlibro" (1932); aŭtoro de "Lingvo Stilo Formo" (1931), "La gramatika karaktero de la Esperantaj radikoj ("1938), "Vojaĝo inter la tempoj" (1966) kaj frazeologia vortaro "Domfabriko" (1975); membro de la Lingva Komitato (LK, 1922-48) kaj AdE (1948-76), honora membro de UEA (1937).

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 150-153.

8. Antaŭ 170 jaroj naskiĝis **John Mabon Warden** (Ŭordn, 1856-1903-1933), skota asekuristo kaj esperantisto, instruisto kaj disvastiganto de Esperanto, prezidanto de Brita Esperanto Asocio (1916-22), membro de LK (1909-33), membro (1920-33), vicprezidanto (1920-33) kaj prezidanto (1931-33) de AdE; kunaŭtoro de "Edinburga Poŝvortaro Esperanta" (1915), ĉefredaktoro de "La Sankta Biblio" (1926).

10. Antaŭ 70 jaroj naskiĝis **Floréal Martorell** (1956-1987-), franca elektristo, muzikeldonisto, kaj esperantisto; fondinto kaj gvidanto de la asocio EUROKKA (1988) kaj de la diskeldonejo Vinilkosmo (1990), kiu produktis multajn muzikalbumojm (kasedoj, vinildiskoj, KDoj, bitalbumoj); prezidanto de la Esperanto-Kulturcentro en Tuluzo (1992-2001), prezidanto de Mezpirenea Esperanto-Federacio (2000-03); direktoro kaj kunredaktoro de "Rok-Gazet'" (1990-2003), redaktoro de la programo "Esperanto-Magazino" ĉe Radio FMR (Tuluzo, 1988-2005); aŭtoro de centoj da primuzikaj artikoloj, ofta preleganto en Esperantaj kongresoj kaj renkontiĝoj, (kun)organizanto de pluraj esperantistaj muzikaj renkontiĝoj kaj festivaloj; laŭreato de la premio Deguĉi (2009) kaj de la Esperanto-Kulturpremio de Aalen kaj FAME (2012).

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 194-195.

10. Antaŭ 65 jaroj naskiĝis **Jean-Marc Leclercq** (leklér, 1961-1988-), Francia okcitana diverslaboristo, muzikisto, fondinto (1990) de la grupo "Les Rosemary's Babies", verkisto kaj esperantisto, konata en Esperanto kiel JoMo; eble la plej populara nuntempa Esperanto-kantisto, fondinto de la grupo "Liberecanoj" (1996), kreinto de la unua rekordo de multlingva koncerto (22 kanzonoj en 22 lingvoj), kiu aperis en 2000 en la rekord-libro "Guinness"; ofta koncertanto en pluraj landoj, gastmuzikisto en pluraj Esperantaj albumoj; liaj Esperantaj albumoj estas "JoMo kaj Liberecanoj" (1998)," JoMo friponas" (2001), "JoMo slavumas" (2006), "jOmO okcitanas" (2016), "MArta kaj JOmo kantas MAYOMA-n" (2021). Laŭreato de la Esperanto-Kulturpremio de Aalen kaj FAME (2026).

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 171-172.

11. Antaŭ 40 jaroj mortis **Xú Shēngyuè** (ankaŭ Xú Zhèn'è, 1901-1928/29-1986), ĉina literaturisto, profesoro pri literaturo en Orient-Ĉina Normala Universitato (Ŝanhajo), tradukisto kaj esperantisto; konata en Esperanto kiel Saint Jules Zee (ankaŭ S. J. Sü); Esperanta poeto kaj tradukanto, interalie de "Fajrolumo en la Fronto" de Liú Bejü (1950), "Sovaĝa Herbaro" de Lusin (1951), "La Plej Forta Voĉo de la Paco" (antologio, 1952), "Por Nova Afero Nova Maniero" (novelaro; kun aliaj, 1952), "La Feliĉo" de Qín Zháoyáng (kun Honfan, 1953), "El ĉina poezio" (antologio, 1980) k. a.

19. Antaŭ 85 jaroj de germanaj okupaciintoj estis murdita **Leopold Blumental** (1865-1887-1941), Ruslanda, poste Pollanda juda juristo, ĵurnalisto, verkisto, tradukisto kaj esperantisto, konata kiel Leo Belmont; pioniro de Esperanto, disvastiganto de Esperanto en gazetaro; kunfondinto de Varsovia Esperanto-Societo kiel filio de la Sankt-Peterburga Esperanto-societo "Espero" (1904), vicprezidanto de PEA ekde ĝia fondo (1908), poste prezidanto de PEA; aŭtoro de kelkaj poemoj en Esperanto, kompilinto kaj tradukinto de "Sonoj Esperantaj: Tradukoj el poetoj polaj kaj alilandaj" (1908), kuntradukinto de "Poemoj" de H. Heine (1928); membro de LK (1905-14, 1923-38) kaj de AdE (1928-38).

26. Antaŭ 45 jaroj mortis **Nguyễn Văn Kỉnh** (1916-1932-1981), vjetnama politikisto (membro de CK de Vjetnama Laborista [nun: komunista] Partio), diplomato (ambasadoro de DR Vjetnamio en Sovetunio, 1957-67) kaj esperantisto; en la junaĝo verkis artikolojn pri Esperanto en gazetaro kaj gvidis senpagan korespondan Esperanto-kurson, kunfondis Koĥinĉinan Esperanto-grupon (1945); gvidis la unuan Esperanto-delegacion de DR Vjetnamio en la 44a UK en Varsovio (1959) kaj kadre de kunveno de MEM en ĉi tiu UK iĝis membro de la Internacia Komitato de MEM; certigis, ke malgraŭ papermanko en Vjetnamio dum la milito aperis pluraj libroj en Esperanto, revuo "Vjetnamio Antaŭenmarŝas" kaj vjetnamiaj numeroj de "Paco"; atingis, ke en decembro 1956 estis akceptita decido pri fondo de Vjetnama Pacdefenda Esperanto-Asocio (VPEA), kiu ricevis konsiderindan ŝtatan subtenon, kaj post la reveno al Vjetnamio en 1968 iĝis prezidanto de VPEA.

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 214-215.

27. Antaŭ 95 jaroj naskiĝis **Werner Bormann** (1931-1947-2013), germana ekonomikisto, ŝtatoficisto kaj esperantisto; prezidanto de Germana Esperanto-Asocio (1967-77), komitatano (1967-95), estrarano (1971-80), vicprezidanto (1974-77) kaj ĝenerala sekretario (1977-80) de UEA, prezidanto de LKK de la 59a UK (Hamburgo, 1974), membro de la financa komisiono de UEA (1992-95); vicdekano de AIS (1986), direktoro de Germana Esperanto-Instituto (1967-92), prezidanto de FAME-Fondaĵo (2000-05); membro (1976-2007) kaj prezidanto (1995-98) de AdE; aŭtoro de pluraj libroj ("Bona ŝanco", 1970; "La lingva problemo en la Eŭropa Komunumaro", 1977; "Funktion und Kultur des Esperanto", 1981; "La evoluo de Esperanto kaj la Akademio", 1984; "Inter senlaboreco kaj inflacio: priskribo de konjunkturpolitiko", 1989; "Entreprenistaj strategioj: priskribo de la entrepreno", 1991; "La merkato de trafikservoj: priskribo de la trafiko", 1992; "Mondkomerco kaj lingvo", 1993; "Elementoj de la esperantismo", 1995; "Interlingvistiko – planlingvoj kaj iliaj ecoj", 2004 k. a.) kaj de multaj artikoloj; honora membro de UEA (1993).

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 42-43.

30. Antaŭ 100 jaroj naskiĝis **Jerzy Fornal** (1926-195?-2013), pola aktoro (rolis en ĉ. 90 spektakloj, dek filmoj kaj kvin filmserioj) kaj esperantisto; aktoro en ĉ. 20 Esperantaj spektakloj, deklamprogramoj kaj pantomimoj ("Aniaro" de H. Martinson, "Sopiro… laboro… espero…" laŭ poemoj de L. Zamenhof, "La arlekeno" de J. Korczak, "El la 'Verda Biblio'" de I. Lejzerowicz k. a.); kunfondinto (kun sia edzino Zofia Banet-Fornalowa, 1983) de la Varsovia teatro "Espero", kiu en 1998-99 kaj 2001-02 aranĝis ĉiumonatajn Esperanto-prezentojn en la artgalerio "Nusantara"; voĉiginto de Korvaks en la instruaj filmoj "Mazi en Gondolando" kaj "Mazi revenas al Gondolando" (1995); aŭtoro de du libroj: "Sopiro… laboro… espero…" (1994), "Virino en kvar bildoj" (1994); laŭreato (kun sia edzino) de la premio de la Fondaĵo Antoni Grabowski (1996).

- Legu pli en la enciklopedio "Nia Diligenta Kolegaro", p. 95-96.

Aleksander Korĵenkov

Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Lingvo



“Interlingvistiko kaj esperantologio: kelkaj spertoj el Nederlando” de Federico Gobbo, profesoro pri interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo, aldoniĝas al la pluraj prilingvaj artikoloj kaj studoj, publikigitaj antaŭ tri monatoj en “La Ondo de Esperanto[logio]”.

Interlingvistiko kaj esperantologio: kelkaj spertoj el Nederlando

de Federico Gobbo

Federico Gobbo estas profesoro pri interlingvistiko kaj Esperanto en la Universitato de Amsterdamo (Nederlando) ekde 2014, laŭ speciala katedro sponsorigita de Esperanto Nederland kaj diversaj landaj asocioj tra formala konsento de la Universitato kun Universala Esperanto-Asocio. Li doktoriĝis en informadiko en jaro 2009 per disertacio pri adpoziciaj gramatikoj. Li instruis interlingvistikon kaj esperantologion en la Universitato de Torino (Italio) dum 8 jaroj kaj estis vizitanta profesoro en Ĉinio en 2012 por instrui filozofion kaj historion de la informadiko rekte en Esperanto.

1. Interlingvistiko, inter scienco kaj arto

En la lastaj du jardekoj, interlingvistiko eliris la aŭlojn de la universitatoj kaj de la fakaj kunvenoj por iĝi fenomeno je dispono de la amasoj. Fakte, en jaro 1996 la Tut-Tera Teksaĵo (TTT)* komencis populariĝi, kaj ekaperis la unuaj katalogoj de la tiamaj 100,000 registritaj retejoj. Jam en jaro 2000 la kvanto 17 milionoj, kaj en 2026 – t.e. hodiaŭ – ili estas ĉirkaŭ 1,5 miliardoj. Kial tiu ĉi epokfara teknologia novaĵo estas tiel grava por interlingvistiko? Ĉar jam en la 1990aj ekaperis la unuaj pioniraj retejoj pri planlingvoj, inkluzive ne nur de Esperanto kaj ĝiaj rivaloj, sed ankaŭ pri lingvoj planitaj por artaj celoj. Menciindas almenaŭ la retejo de la Klingona Lingva Instituto (KLI), kies pli malnova versio registrita per la retejo *Web Archive* datas la 21an de decembro 2006, anoncante la novan tradukon de la Ŝekspira Hamleto al la klingona. Aparte la bitrevolucio efikis en la kazo de Esperanto, ĉar la disvastigo de la TTT igis la lingvon mojosa, speciale por gikoj kaj nerdoj, kiuj vivas la bitan mondon kiel parton de ilia persona identeco (Gobbo 2021, Fians 2021).

Malgraŭ la graveco de la bitrevolucio por la amasoj evidentiĝis al ĉiuj humanistismaj disciplinoj almenaŭ ekde la estiĝo de la nova jarmilo, ĝi estis preteratentita de multaj interlingvististoj dum jardekoj. Ankoraŭ lastatempe, Fiedler (2019b) rezervas la uzon de la vorto ‘planlingvo’ nur al lingvoj planitaj por faciligi la interkomprenon

* Erare oni nomu ĝin ‘interreto’, ĉar la komputil-konektiga infrastrukturo interreto jam ekzistis dum jardekoj, malgraŭ la manko de grafikaĵoj kaj de facilaj interfacoj, tiel, ke, laŭfakte, ĝi restis je dispono nur de informadikistoj kaj aliaj fakuloj.


internacie inter malsamlingvuloj, eĥante sian tiaman mentoron Detlev Blanke, firme ekskludante la planlingvojn kiuj naskiĝis sub la egido de TTT kiel aparta, marĝena fenomeno. Fakte, la germana skolo pri interlingvistiko, kiu ariĝas ĉirkaŭ la Societo por Interlingvistiko (GIL) ekde ĝia fondiĝo en Berlino en 1991 – ĵus post la falo de la Berlina Muro kaj la reunuiĝo de Germanio – ĉiam tenis je sia horizonto nur la planlingvigan celon, t. e. la internacian komunikadon. Mi nomas ĉi tiun aliron al la disciplino 'klasika interlingvistiko'.

Blanke (2017) bone konsciis, ke la geopolitika rolo de Esperanto kiel ponto inter la socialisma Oriento kaj la kapitalisma Okcidento finiĝis per la disfalo de Sovetunio, kiu hazarde koincidis kun la advento de la TTT. Tamen, la maniero koncepti interlingvistikon, por li, Sabine Fiedler kaj multaj aliaj, ne vere ŝanĝiĝis: Esperanto estas la pinto de la disciplino, ĉar ĝi sukcesis iĝi plene vivanta lingvo – por pruvi tion, oni ofte mencias la plurgeneracian ekziston de denaskuloj – male al ĉiuj rivaloj, ekde la antaŭula Volapuko ĝis la posteulaj reformoj, super ĉio Ido, kaj la efemeraj Novialo kaj Okcidentalo/Interlingveo.

Fiedler (2019a) pledas por studado de Esperanto kiel vivanta lingvo, ĉar "lingvistiko hodiaŭ estas uzobazita", kaj la aliaj planlingvoj apenaŭ uzatas parolforme, kompare kun Esperanto. Estas vere, ke tia interlingvistiko, en kiu oni sisteme komparis la *strukturon* de la rivaloj por planlingve komuniki internacie, ĉesis interesi la ĝeneralan publikon, fakulojn kaj sciencistojn post la fermo de *International Auxiliary Language Association* (IALA) kaj la ekestiĝo de *Union Mondial pro Interlingua* (UMI), kiu iel reproduktis mikroskale la strukturon de la ĉefa Esperanto-Movado ĉirkaŭ UEA, sed kun magraj rezultoj. Tamen la risko, se oni insistas iri tian vojon, estas la malapero de la disciplino entute: ekde la momento kiam oni prifajfas la planlingvan originon de Esperanto por esplori ĝin, kiel ŝajnas sugesti Lindstedt (2024), interlingvistiko kiel disciplino muzeiĝos, nur retrospektive rigardante la mortintajn projektojn kaj efemerajn lingvokomunumojn de la rivaloj de Esperanto.

Oni devas koncedi, ke inventi lingvojn (tio ja estas sinonimo de 'plani'), tio estas konscie pretigi lingvoformon per skribita projekto inkluzive de fonetiko, fonologio, morfologio, sintakso kaj semantiko pere de gramatiko kaj vortprovizo, ne koncernas *nur* seriozcelan internacian komunikadon. Tia strikta difino malinkluzivas fenomenojn de *distra* internacia komunikado. Aparte grava freŝdata fenomeno estas la tokipona, lingvo por introspekte analizi sian vivaliron kaj filozofion. Ĝi furoras ankaŭ inter TEJO-aĝaj esperantistoj, je la punkto, ke la ĉi-jara IJK en Tiana, Katalunio, gastigas paralele la 5-an Eŭropan Tokiponan Renkontiĝon. Kiel oni povas konsideri la tokiponan preteratendinda do?

Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa somera *Ondo.* Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm



“La sinjoro el San-Francisko” de Ivan Bunin ne povis aperi kadre de nia projekto “Rusa Novelaro 2”, ĉar ĝi estis tro ampleksa, sed nun ni aperigas ĉi tiun faman Buninan verkon. Ĝin garnas ilustraĵoj de Orest Verejskij (supre) kaj Oleg Korovin (en la teksto).

La sinjoro el San-Francisko

de Ivan Bunin



Ve! ve, Babel, la forta urbo![1]
Apokalipso

La sinjoro el San-Francisko – neniu en Napolo kaj Kapreo memorfiksis lian nomon – estis vojaĝanta al la Malnova Mondo por du plenaj jaroj kun siaj edzino kaj filino, nur por amuziĝo.

Li estis tute certa, ke li havas la rajton por ripozo, por plezuro, por vojaĝo longa kaj komforta, kaj por multaj aliaj aferoj. Por tia certeco li havis jenan rezonon: unue, li estis riĉa, kaj due, malgraŭ siaj kvindek ok jaroj li ĵus komencis vivi. Ĝis nun li ne vivis, sed nur ekzistis, kvankam tute ne malbone, sed rezervante ĉiuj siajn esperojn por la estonteco. Li laboregis senlace – miloj da ĉinoj, kiujn li varbis, por ke ili laboru por li, bone sciis, kion tio signifas! – kaj finfine li ekvidis, ke jam multo estas farita, kaj ke li preskaŭ atingis la nivelon de tiuj, kiujn li iam taksis kiel sian modelon, kaj do li decidis preni paŭzon por ripozi. La homoj de la klaso, al kiu li apartenis, havis la kutimon komenci la ĝuadon de l' vivo per vojaĝo al Eŭropo, al Barato, al Egiptio. Ankaŭ li decidis fari la samon. Nature, li deziris rekompenci unue sin mem pro la multaj jaroj da laborado, sed li estis ĝoja ankaŭ pro siaj edzino kaj filino. Lia edzino neniam distingiĝis per speciala impresiĝemo, sed ja ĉiuj nejunaj usonaninoj estas pasiaj vojaĝantinoj. Kaj se temas pri lia filino, jam plenaĝa kaj iomete malsanema fraŭlino, por ŝi ĉi tiu vojaĝo estis vere necesa – ja krom la utilo por la sano, dum la vojaĝoj povas okazi feliĉaj renkontiĝoj, ĉu ne? Ja foje estas okazoj sidi ĉe la manĝotablo aŭ spekti freskojn apud miliardulo.

La sinjoro el San-Francisko pretigis ampleksan vojaĝplanon. En decembro kaj januaro li esperis ĝui la sunon de suda Italio, antikvajn monumentojn, tarantelon, serenadojn de vagantaj menestreloj kaj tion, kion liaj samaĝuloj sentas precipe delikate – la amon de junaj napolaninoj, eĉ se tiu ne estas tute senprofita. La karnavalon li intencis pasigi en Nico kaj Montekarlo, kie tiutempe kunvenas la plej elita

societo, – ĝuste tiu, de kiu dependas ĉiuj bonaĵoj de la civilizacioj: kaj la fasono de la smokingoj, kaj la stabileco de la tronoj, kaj la deklaroj de militoj, kaj la prospero de la hoteloj, – kie iuj kun vervo dediĉas sin al aŭtomobilaj kaj velŝipetaj konkuroj, iuj al ruleto, iuj al tio kion oni kutime nomas flirtado, kaj iuj al pafado de kolomboj, kiuj tre bele elflugas supren el kaĝoj super la smeralda gazono sur la fono de la miozotkolora maro kaj tuj falas kiel blankaj buletoj, frapante la teron. La komencon de marto li volis dediĉi al Florenco, por la Sankta Semajno li planis veni al Romo por aŭskultado de Miserere[2]. En lia plano estis kaj Venecio, kaj Parizo, kaj bovbatalo en Sevilo, kaj naĝado en anglaj insuloj, kaj Ateno, kaj Konstantinopolo, kaj Palestino, kaj Egiptio, kaj eĉ Japanio, – memkompreneble, jam dum la revena vojaĝo… Kaj ĉio komenciĝis bonege.

Estis la fino de novembro. Dum la tuta vojo ĝis Gibraltaro la ŝipo navigis jen en glacia nebulo, jen tra ŝtormo kun humida neĝo, sed la navigado estis tute senproblema. Estis multaj pasaĝeroj; la vaporŝipo – la fama “Atlantido” – estis simila al grandega hotelo kun ĉiuj komfortaĵoj: kun nokta drinkejo, kun turkaj banejoj, kun ĵurnalo redaktata kaj presata sur la ŝipo. La ŝipa vivo pasis laŭ la horaro: la pasaĝeroj frue vekiĝis laŭ la fumtubaj sonoj, stride sonantaj en la koridoroj dum tiu krepuska tempo, kiam la taglumo tre lante kaj malafable estis aperanta super la grizverda akvodezerto, peze ondiĝanta en la nebulo; surmetinte flanelajn piĵamojn, ili trinkis kafon, ĉokoladon, kakaon; poste ili mergiĝis en la marmorajn bankuvojn, faris gimnastikon, vekante apetiton kaj bonfarton, plenumis matenan tualeton kaj iris al la unua matenmanĝo. Ĝis la dek-unua horo estis proponate vigle promeni sur la ferdekoj, spirante la freŝecon de la oceano aŭ ludi shuffleboard[3] kaj aliajn ludojn por denove veki apetiton, kaj je la dek-unua ili refreŝigis siajn fortojn per sandviĉoj kun buljono; refortiĝinte, ili kun plezuro legis la ĵurnalon kaj trankvile atendis la duan matenmanĝon, eĉ pli nutran kaj varian ol la unua. La du sekvaj horoj estis dediĉitaj al ripozado: sur ĉiuj ferdekoj oni metis densan amason da ferdekseĝoj, sur kiuj la vojaĝantoj kuŝis, kovrinte sin per plejdoj, rigardante al la nuboplena ĉielo kaj al la ŝaŭmantaj ondoholmetoj, vidiĝantaj post la bordo, aŭ dolĉe dormante. Je la kvina horo oni regalis la pasaĝerojn per forta aromanta teo kun biskvitoj; kaj je la sepa horo oni informis ilin per trumpetaj sonoj pri tio, kio konsistigis la plej ĉefan celon de ilia tuta restado ĉi tie, pri ĝia krono…. Kaj tuj post tio la sinjoro el San-Francisko, pro la alfluo de la vivoforto kunfrotante siajn manojn, rapidis al sia luksa kajuto por revesti sin.

Dum la vesperoj la etaĝoj de “Atlantido” en la obskuro aspektis kvazaŭ nekalkuleblaj fajraj okuloj, kaj granda nombro da servistoj laboris en la kuirejoj, vazlavejoj kaj vinkeloj. La oceano, moviĝanta trans la muroj, estis terura, sed neniu pensis pri ĝi, firme kredante je la povo de la kapitano super ĝi. Li estis rufhara homo monstre granda kaj peza, ĉiam kvazaŭ dormema, en sia uniformo kun larĝaj oraj galonoj simila al giganta idolo kaj tre malofte aperanta publike el sia mistera apartamento. La sireno sur la antaŭa ferdeko ĉiuminute ululis kun infera makabreco kaj jelpis kun

furioza malico, sed nur malmultaj el la manĝantoj aŭdis la sirenon – ĝin surdigis la sonoj de la elstara kordinstrumenta orkestro, fajne kaj senlace ludanta en la alta marmora duoble alta salono[4] kun veluraj tapiŝoj sternitaj surplanke, feste inundita de la lumo, plenplena de dekoltitaj virinoj, viroj en frakoj kaj smokingoj, sveltaj lakeoj kaj respektoplenaj ĉefkelneroj, inkluzive de unu, kiu akceptis mendojn nur por vinoj, paŝis kun ĉeno sur la kolo, kvazaŭ iu lordo-urbestro. La smokingo kaj la amelita ĉemizo tre junigis la sinjoron el San-Francisko. Magra, nealta, plumpe tajlita, sed fortike kunkudrita, purigita ĝis glaceiĝo kaj modere vigliĝinta, li sidis en la ora-perla brilado de ĉi tiu palaco kun botelo da sukcenkolora Johannisberg[5], ĉe pokaloj kaj pokaletoj faritaj el plej delikata vitro, post krispa bukedo da hiacintoj. Io mongoleca estis en lia flaveta vizaĝo kun kurte tonditaj argentaj lipharoj; brilis oraj kronaĵoj sur liaj grandaj dentoj, kaj kiel malnova eburo brilis lia fortika kalva kapo. Riĉe, sed konvene al sia aĝo estis vestita lia edzino, grandkorpa, larĝa kaj kvieta virino; pli inventeme, sed malpeze kaj travideble, kun kvazaŭ senkulpa sincereco estis vestita lia filino, alta, svelta, kun belega hararo ĉarme aranĝita, kun aroma spirado pro la violaj bombonetoj, kaj kun delikataj iom pudritaj rozkoloraj akneoj apud la lipoj kaj inter la skapoloj. La vespermanĝo[6] daŭris pli ol unu horon, kaj post la manĝado en la bala salono komenciĝis dancado, dum kiu la viroj, – inter kiuj, kompreneble, estis ankaŭ la sinjoro el San-Francisko, levinte la piedojn, estis decidantaj la sortojn de la popoloj surbaze de la plej freŝaj borsaj novaĵoj, fumis Havanajn cigarojn ĝis frambokolora ruĝiĝo de la vizaĝoj, kaj ebriiĝis per likvoroj en la trinkejo, kie servis negroj en ruĝa uniformo kun okulblankoj similaj al senŝeligitaj malmole kuiritaj ovoj. Trans la muro la nigraj montoj de la oceano brue moviĝis, la blizardo laŭte fajfis en la peziĝinta ŝnuraro, la tuta ŝipo tremis, superante la blizardon kaj la akvomontojn, kvazaŭ per plugilo rompante iliajn malfirmajn amasojn, kiuj jen kaj jen ekbolis kaj suprenĵetis ŝaŭmantajn vostojn; en mortiga angoro lamentis la sireno sufokata de nebulo, la deĵorantoj en sia vaĉejo frostis pro la malvarmo kaj estis perdantaj la kapablon racie pensi pro la neeltenebla streĉado de atento; simila al la makabra kaj varmega profundo de la infero, al ĝia lasta, la naŭa rondo estis la subakva ventro de l' ŝipo – tiu, en kiu obtuze blekaĉis la grandegaj fornaj brulujoj, kies inkandeskaj faŭkoj voradis amasojn da karbo, kun krakado enĵetata de ĝistalie nudaj homoj, purpuraj pro la flamo kaj superverŝitaj de akra, malpura ŝvito. Sed ĉi tie, en la trinkejo, oni senzorge levis siajn piedojn sur la fotelajn brakojn, glutetis konjakon kaj likvorojn, ŝvebis en la ondoj de spica fumo; en la dancejo ĉio brilis kaj verŝis lumon, varmon kaj ĝojon, paroj jen turniĝis en valso, jen fleksiĝis en tango – kaj la muziko insista, en iu dolĉa-senhonta tristo ĉiam petegis pri la samo, ĉiam pri la samo… En ĉi tiu brilanta amaso estis eminenta riĉulo kun la razita kapo, simila al prelato



en sia malnovmoda frako, estis fama hispana verkisto, estis belulino konata de ĉiuj, estis gracia paro da geamantoj, kiun ĉiuj scivoleme observis, kaj kiu ne kaŝis sian feliĉon: li dancis nur kun ŝi, kaj ili faris ĉion tiel delikate, tiel ĉarme, kaj nur la kapitano sciis, ke ĉi tiu paro estis dungita de la vaporŝipa kompanio por ludi amon kontraŭ bona salajro kaj ke ili jam longe veturas en diversaj ŝipoj.

En Gibraltaro la suno ĝojigis ĉiujn, tio similis al frua printempo. En “Atlantido” aperis nova pasaĝero, kiu vekis ĉies intereson – kronprinco de iu Azia ŝtato, vojaĝanta inkognite: malalta homo, lignece rigida, larĝvizaĝa, stretokula, kun oraj okulvitroj, iom malagrabla pro tio, kie liaj grandaj nigraj lipharoj estis travideblaj kvazaŭ tiuj de mortinto, sed ĝenerale agrabla, senafekta kaj modesta. En Mediteraneo denove sentiĝis vintro, la ondoj estis grandaj kaj buntaj, kiel pava vosto, ilin sub la brilanta suno kaj tute sennuba ĉielo kreis tramontano, gaje kaj rapidege flugante renkonten. Poste, je la dua tago, la ĉielo komencis paliĝi, la horizonto nebuliĝis: proksimiĝis la tero, videbliĝis la insuloj Ischia kaj Kapreo; per binoklo oni povis vidi Napolon ŝutitan kiel sukerpecoj ĉe la piedo de iu griza monto… Multaj damoj kaj ĝentlemanoj jam surmetis malpezajn paltojn kun ekstera pelto; humilaj kaj ĉiam flustre parolantaj ĉinaj servistoj, kurbakruraj adoleskantoj kun longaj gudre nigraj harligoj kaj knabinece longaj okulharoj, nerimarkate portis al la ŝtuparoj plejdojn, marŝbastonojn, valizojn, necesujojn… La filino de la sinjoro el San-Francisko staris sur la ferdeko apud la princo, kiun oni hieraŭ vespere pro feliĉa hazardo prezentis al ŝi, kaj ŝajnigis, ke ŝi atente rigardas al la foro, kien li montris al ŝi, ion klarigante, ion rapide kaj nelaŭte rakontante. Pro sia staturo li ŝajnis knabo inter la aliaj, li estis tute nebela kaj stranga – okulvitroj, bulĉapelo, angla mantelo, sed liaj maldensaj lipharoj aspektis kiel ĉevalaj haroj, la malhela kaj maldika haŭto sur lia plata vizaĝo estis kvazaŭ distirita kaj eĉ iomete polurita, – sed la junulino aŭskultis lin kaj pro emociiĝo ne komprenis, kion li diras al ŝi; ŝia koro bategis pro la nekomprenebla admiro je li: ĉio en li, ĉio estis malsama ol en la aliaj: liaj sekaj manoj, lia pura haŭto sub kiu fluis antikva reĝa sango, eĉ lia eŭropa, tute simpla, sed kvazaŭ speciale pura vestaĵo, ĉio entenis en si neklarigeblan ĉarmon. Sed la sinjoro el San-Francisko mem, kun grizaj gamaŝoj kaj lakitaj ŝuoj, ofte ĵetis rigardojn al la staranta apude fama belulino, alta, kun mirinda figuro kaj ĉirkaŭpentritaj okuloj laŭ la lasta Pariza modo; ŝi tenis per arĝenta ĉeno etan, kurban, senfelan hundon kaj konstante alparolis ĝin. Kaj la filino sentante iun svagan embarason, klopodis ne rimarki lin.

Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo: https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Kelkaj kortuŝaj momentoj en mia esperantista vivo



de Miguel Fernández

1. Ĉirkaŭ Deborah Carter

La 43a Kongreso de HEF (Hispana Esperanto-Federacio), okazinta en la urbo Zaragozo en julio 1983, markis la debuton de mi kiel ĉeestanto ĉe Esperanto-kongresoj… Kaj tie mi spektis prelegon de la eminenta esperantisto kaj profesoro Juan Régulo Pérez kaj interparolis – por la unua kaj ununura fojo – kun Fernando de Diego, la homo, kies linvgouzon kaj traduktteknikon mi poste ĝuis, studis, provis markoti en miajn verkojn. Fernando de Diego, la majstro de tuta grupo de Esperanto-verkistoj en la Ibera Duoninsulo: la t. n. Ibera Skolo.

Tiukadre, iunokte, la karmemora madrida esperantisto Juan Carlos Ruiz Sierra kaj mi promenadis surstrate. Donis plezuron spiri la friskan aeron de la nokto post sufoke varma tago. Subite, logis nin la eĥoj de anim-karesa muziko kaj sorĉa voĉo. Spurante la fonton de tiom da belo, ni revenis sur niaj paŝoj kaj eniĝis en la bufed-salonon de *pub*[1]. Kiam ni eniĝis en pli internan ĉambron, la bildo nin forrabis: ĉe la centro, sur podio, belega nigrahaŭta virino – svelta, juna, graciplena – vera diino el ebono, kantis kiel anĝelo, virtuoze akompanante sin per piano. Sur ŝiaj lipoj, la renoma “Feelings”, ĵaze harmonizita, tuŝis la internajn fibrojn, kiujn neniu antaŭe kapablis eĉ sugesti, surbaze de forto, de sentivo, de aŭtento… Sekvis kantoj, kiujn iam famigis Roberta Flack (“Killing Me Softly with His Song”), Mahalia Jackson, Natalie Cole… sed rekreitaj laŭ la senkompara stilo de tia reĝino de Ŝebao.

Ĉe la paŭzo Juan Carlos kaj mi aliris ŝin, kaptitaj de entuziasmo. Ŝi, tiel senafekta kaj afabla kiel bela, rakontis al ni, interalie, ke ŝi, denaska usonanino, jam de longe loĝas en Zaragozo kun la panjo, tiea instruistino pri kant-arto kaj muziko, kaj sciigis nin pri sia projekto viziti Madridon por fari prezentadojn en tiea ĵazejo kaj en televido. Ni donis al ŝi niajn telefonnumerojn por la okazo, se ŝi povos nin kontakti kaj tiel ebligi nin spekti ŝian ludadon niaurbe, sed tute konsciaj pri la neprobableco de ŝia voko.



Sekvatage ni revenis kun multaj muzikamaj gekongresanoj, kiuj konstatis, ke nia entuziasmo tute pravigeblas. Nia diino el ebono dediĉis sian sen-egalan “Feelings” al la geamikoj-esperantistoj. La salono bolis. Des pli, kiam ŝi finis sian kanton. Siajn kantojn. Kiom da ŝi faris ĉe nia bisado kaj laŭ niaj petoj? Ni aŭskultus ŝin la tutan nokton. Ŝi fariĝis la nekontestebla reĝino de la eksterkongresaj horoj. Kiel unikaj horoj!

Iam en aŭtuno mi ricevis vokon de Juan Carlos. “Ŝi estas en Madrido kaj ĵus telefonis!!!” En la kvar kvin tagoj, kiam ŝi prezentis sin ĉe *Arenal Jazz Club*, tiama templo de ĵazo en Madrido, Juan Carlos kaj mi ĉiunokte venis tien kun diversaj geamikoj, kiuj nepre iĝis envultitaj de la imponaj arto, beleco kaj personeco de nia reĝino de Ŝebao.

La lastan nokton ne malmultaj figuroj de la hispana ĵazo, interalie, Pedro Iturralde, profesoro pri saksofono ĉe la Madrida Konservatorio, troviĝis tie. Nia nigra stelulino kantis kaj pianis tiel superbe kiel kutime. Kaj, kiel kutime, dediĉis al la geamikoj-esperantistoj sian “Feelings”. Kiom da jam endormiĝintaj anguloj de mia animo ekzaltiĝas ĉe tiaj rememoroj!


Ĉe la fino de sia prezentado, ŝi descendis el la scenejo kaj sin turnis ne al la lucernoj de ĵazo, kiuj supozeble atendadis ŝin, sed al ni!!! Niaj akompanantoj apenaŭ povis tion kredi. Neforgeseblas ilia ĉiam pli prilumita vizaĝo, laŭ la mezuro, kiel ŝi proksimiĝis al ni. Kaj, kiel ĉiunokte, ŝi eksidis ĉe ni por paroli pri muziko, pri vivo, pri esperoj… Sed ĉi-okaze ŝi volis aparte kunfesti sian lastan nokton ĉe ni: “Kelnero, ĉampanon por miaj geamikoj, mi petas”. Pluraj el tiuj ne povis artikulacii vorton kaj plue mirgapas ĉe tia rememoro.

Tielis nia diino el ebono! Ŝi estis Deborah Carter, granda internacia ĵaz-kantistino el Usono tiame loĝinta en Zaragozo.

2. Ĉirkaŭ Federico García Lorca

Kiel sciate, Federico García Lorca, lia personeco, lia verkaro, lia epoko, la plejado, de kiu li estis membro, nome la t. n. Generacio de 1927… konstituas ĉefan parton kaj kialon de mia pasio al poezio. Ĉe Federico, mi trovis la ravan emocion jam spertitan de mi kiel infano, kiam, en interpretado far parencoj de Manola, mia cigana najbarino en domo de la Granada kvartalo Albaycín, mi aŭskultis la andaluzajn kantojn nomatajn flamenko[2] kaj poemojn de Federico García Lorca, “poeto, kiun *ili* murdis”, ŝi aldonis mallaŭte antaŭ ol komenci interpreti Lorca’aĵojn. Kaj ĉe li mi trovis la diraĵojn kaj vivkonceptojn de ĉiuj Manola’j, kiuj prilumis mian infanecon. Ju pli mi studis lin kaj lian mondon, des pli mi amis la poezion kaj la historion de la progresema Hispanio venkita de faŝismo.

Lerninte Esperanton, mi adoptis ĝin kiel mian verkolingvon. Mi komencis provi la novan promesplenan instrumenton, unue, sur la traduka tereno. La unua beletraĵo, super kiu mi laboris, estis ĝuste la Lorca'aĵo "La casa de Bernarda Alba" [La domo de Bernarda Alba]. Poste mi akceptis eĉ pli grandan defion: esperantigi duan dramon de mia universala samurbano "Bodas de sangre" [Sanga nupto]. Kial tia defio pli grandis? Nu, ĉar, kvankam ĉi verko plejparte disvolviĝas en prozo, en kelkaj esencaj momentoj, por substreki la draman agadon kaj por akcenti la pasian tonon de la intrigo, Federico uzis en ĝi versojn. Kaj li, krom poeto, dramaturgo, teatroreĝisoro ktp, estis muzikisto. La muziko, la ritmo, de liaj versoj, ĉiam havas konotacian valoron. Aldonas potencajn sonorajn sugestojn al la tuto. Mi do kvazaŭe "radiografiis" la ritman skemon de la originalaj versoj de la dramo kaj klopodis kiel eble plej fidele laŭiĝi al ĝi. Ĝenerale, tian kriterion mi adoptis por ĉiuj poemoj de Lorca, kiujn de tiam ĝis nun mi tradukis.



En 1987 ambaŭ esperantigoj, "Sanga nupto" kaj "La domo de Bernarda Alba", aperis libroforme en unu sola volumo, kiel la n-ro 23 de la serio Oriento-Okcidento de UEA. Por akiri la eldonrajtojn, mi turnis min al la sidejo de la Fondaĵo Federico García Lorca, ene de la t .n. Studenta Restadejo en Madrido. Tie mi havis la fortunon starigi kontakton kun familianoj de la poeto. Kun lia malplej aĝa fratino Isabel, instruistino pri literaturo kaj verkistino. Kun ilia nevo Manuel Fernández-Montesinos García Lorca, socialisma politikisto el Granado. El ili, mi ricevis ne nur eldonpermeson, sed kor-karesajn montrojn de akceptemo, de spirito aperta al mia laboro kaj al Esperanto. Mi ricevis la eblon paroli ĝuste kun ili pri Federico kaj pri ties verkoj, aliri arĥivojn, akiri kopiojn de fotoj… Kaj fojfoje paroli kun elstaraj hispanaj kaj eksterlandaj Lorca'istoj, kiuj vizitis tiun interesplenan centron.

La libron mi prezentis la 25an de novembro de nia Jubilea Jaro 1987, en unu el la plej gravaj kulturejoj en la hispana ĉefurbo, la t.n. Madrida Ateneo, kie en la unua triono de la pasinta jarcento la eminenta hispana esperantisto Julio Mangada Rosenörn instruadis Esperanton. Ĉe la centro de la oratora tablo sidis Isabel García Lorca kaj mi mem. Akompanis nin du apartaj esperantistinoj. Unuflanke Lucrecia San Antonio, poetino, lernantino kaj amikino de Mangada. Aliflanke, apud mi, la tiama redaktorino de "Heroldo", mia karmemora Ada Fighiera-Sikorska, kiun mi ĉiam nomis "mia patrino per Esperanto". Fine de la prezentado, Isabel García Lorca diris jenajn (en mia esperantigo) belajn vortojn favorajn al nia lingvo kaj al nia afero:

Ĝi estas demonstra versio de la 127-paĝa somera *Ondo*. Por legi la tutan gazeton oni devas aboni ĝin. La jarabono kostas nur 15 eŭrojn. Pli detale pri la aboneblo de *La Ondo de Esperanto* legu en nia retejo:
https://esperanto-ondo.ru/Lo-abon.htm

Mozaiko



La pentraĵo “Aŭtuno en provinco. Temanĝo” (1926) de Boris Kustodijev montras la kvietan etoson de provinca urbo, sed ĉi tiu idilia bildo estis nur junaĝa rememoro de la paralizita pentristo, disvendanta sian havaĵon por iel pluvivi en la “lando de l’ venkinta proletaro”. Espereble, niaj nordhemisferaj legantoj nun en pli bonaj kondiĉoj ĝuas la aŭtunon.

La plej fruaj Esperantaj ŝercoj

La tri unuaj jarkolektoj de la unua esperantista gazeto “La Esperantisto” (1889-91) estis tre gravaj por la nova lingvo, sed iom tro seriozaj. En la januara eldono de LE por la 1892a jaro Zamenhof, kiu redaktis la gazeton, enkondukis la rubrikon “Bagateloj”. En la januara rubriko aperis nur unu duonpaĝa rakonteto “El unu prediko”, sed en la dua estis kolekto de pluraj ŝercoj, kelkajn el kiuj ni proponas al vi por (re)legado.

Cetere, kiu ŝerco de avĉjo Lućjo plej plaĉis al vi?

Bagateloj

Kredemeco. A: Vi estas malsaĝulo, mia sinjoro! – B: Sinjoro! Mi sendos al Vi miajn atestantojn! – A: Ne bezone, sinjoro, mi kredas tion ĉi ankaŭ sen atestantoj.

Senkulpiĝo. Sinjorino, forlasante sian servistinon: Jes, mi bedaŭras, sed mi ne povas repreni mian ateston en via serva libro pri via nepuremeco. Rigardu do mem ekzemple la malpuraĵon de muŝoj tie ĉi en la angulo. – Servistino: Tio ĉi ja estas ne mia kulpo! Tiu ĉi malpuraĵo jam estis, kiam mi antaŭ jaro komencis mian servadon ĉe Vi.

La inkujo. Knabo aĉetis boteleton da inko kaj rapidis domen. En la mezo de la strato la inkujo elfalis el lia mano kaj rompiĝis kaj la tuta inko elverŝiĝis sur la teron. Konfuzite la knabo staras kaj malgaje rigardas la elverŝitan inkon. ”Nu, kion vi staras, mia knabo?” diris unu preteriranto, “vi jam elskribis la tutan inkon kaj nun vi povas trankvile iri domen!”

Principo. Luigantino de ĉambro: Antaŭ ol Vi enloĝiĝas en mia ĉambro, mi devas al Vi rimarki, ke mi amas, ke oni akurate pagu la luan pagon. – Studento: Tio ĉi estas ankaŭ mia principo; aŭ akurate aŭ tute ne!

Bonigo. Fianĉino: Diru, ĉu estas vera tio, kion mia patrino al mi diris? – Fianĉo: Kion do? – Fianĉino: Ke vi edziĝas je mi, ĉar mi poste havos grandan sumon da mono. – Fianĉo: Sed, mia infano, kontraŭe! Estus al mi eĉ pli agrable, se vi ĝin havus jam nun.

Tro granda postulo. – For! Al sanaj kaj fortaj mi almozon ne donas. – Kiel Vi volas; pro Viaj kelkaj centimoj mi al mi piedon ne rompos.

Malbona memoro. – De kio vi havas tian embarasan mienon? – Ha, prezentu al vi mian teruran situacion: mi petis hieraŭ fraŭlinon Marion pri ŝia mano kaj mi ne memoras, kion ŝi al mi respondis: jes, aŭ ne…

La patro scias. – Mia knabo, kial vi tiel forte ploras? – Mia patrino donis al mi batojn! – Nu, tio ĉi ne estis ja kredeble tiel terura! – Ne terura? Ha, ha! Demandu do mian patron, ĉu mia patrino ne bone batas!

La Esperantisto, 1892, №2

Spritaj splitoj kaj preskeraroj

El la kolekto de reduktoro

Ĉe UEA la jaroj longas

Nederlanda esperantisto, instruisto kaj longjara oficisto de Universala Esperanto-Asocio… (Kongresa Libro, Brno, 2025, p. 30)

Skua dancigo

Apenaŭ la muziko ekaŭdiĝis, la piedoj ekvom… ekmoviĝas. (Aŭdita dum la Nacia Vespero de la Universala Kongreso en Graco, 2026)

Diktatora koncizeco

… la estrema mallongeco de la poeziaĵoj… de Daphne Lister… (Carlo Minnaja, Giorgio Silfer. Historio de la esperanta literaturo. La Chaux-de-Fonds: LF-Koop, 2015, p. 433)

Miloj el Tibeto lertigitaj

La aŭstra esperantisto Martin Stuppnig hodiaŭ festas 100 jarojn… kion li faras por resti en tia bonega stato… ĉiutage ekzercas kvin tibetanojn… (Bulteno de Esperantista Klubo en Prago 2025, №3, esperanto-indre.com/IMG/pdf/b032025.pdf)

Majstro debatis kun malseka furzo

… interesa debato inter la puliko kaj la ĉeestanta aŭtoro, c-ano Giorgio Silfer. (Eminenta unua tago de Kultura Esperanto-Festivalo esperantio.net/heko/eminenta-unua-tago-de-kultura-esperanto-festivalo; 26 jul 2026, trovis Ionel Oneț, stato 21 sep 2026)

Tute interpunkcie

Komforme kun tio ni ankaŭ por 2026 lanĉas la konkurson “Plej bona reganto de Esperanto”. (https://edukado.net/ekzamenoj/ker/konkurso, stato 21 sep 2026, trovis Ibrahim Bryzgaloff)

Kristalklara disdivido

La tuta verkista tempo de Dazaj estas kutime dividita en tri periodojn: la unua, la dua kaj la tria. (Tacuo Huĝimoto. Kromeseoj. Oosaka: Riveroj, 2009, p. 95)

Reĝidino sur pizo?

Ŝi surpizas min per sia invito… (Roman Dobrzyński. Romano pri Romano, Varsovio: PEA, 2025, p. 224)

Plukis **István Ertl**